

SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista (BEOGRAD, Jugoslavio)	El. Vol 22 n-ro 3(89) 15. 5. 1971.
---	--

LA NOMOJ DE LA CETACOJ.

(tria parto — anekso: Nova Biologia Nomenklaturon)

(W.M.A. De Smet, Belgio) *)

Enkonduka noto:

Per la sekvanta teksto estas kunigitaj la ideoj, laŭ kiuj estas elpensitaj la animalnomoj troveblaj en la teksto: »La nomoj de la cetacoj«. Tiuj samaj ideoj estas aplikitaj por la nomoj troveblaj en la teksto »La polipteroj, strangaj afrikaj fiŝoj« (redaktita en la 1958. kaj aperinta en la 1959) krom kelkaj postaj plibonigoj, kiel ekzemple tiuj de eroj 7, 11 kaj 16.

La ideoj pri tiu nomenklaturon do ne estas novaj ĉe la aŭtoro, sed pro daŭra manko de tempo estis maleble al li konigi ilin koncize kaj plie apliki ilin. Pliperfektigoj restas ĉiam eblaj.

A. PREZENTO

I Nova Biologia Nomenklaturon (mallongigita: NBN) (I) estas sistemo por nomi animalojn kaj plantojn de bone pristuditaj ordoj aŭ familioj laŭ difinitaj principoj.

Ekz.: *Sulkarbaleno* subordotipa estas nomo kiu en sia konsisto konformas al principoj.

Aldonaĵoj: I. Tiu ĉi sistemo celas ripari al la multnombraj neperfektaĵoj, komplikaĵoj, kapricaĵoj kaj nesencaĵoj de la nun ekzistantaj latindevenaj zoologia kaj botanika nomenklaturon, kiuj baziĝas sur ofte ŝanĝintaj principoj kiuj ekestis post la apero de la iniciata libro de tiuj nomenklaturon: »Systema naturae, Editio X« de C. Linnaeus en la 1758. Vidu en la teksto »La nomoj de la cetacoj« plurajn ekzemplojn de nesencaĵoj kaj aliaj:

2. Oni notu tamen ke NBN nur povas esti aplikata al ordoj aŭ familioj por kiuj kompetenta specialisto faris kompletan liston de ĉiuj nun konataj specioj, almenaŭ de la nun vivantaj.

Ekz.: HERSHKOVITZ faris revizion de la ordo de cetacoj en »Catalog of living whales«. Tiu ĉi katalogo

*) D-ro en zoologio (Wilgendreeft 14, Heide, KALMTHOOT, 4180 Belgio).

go servis por apliki NBN al la nun vivantaj specioj de cetacoj.

3. Se NBN havas sukceson, ĝi povos iom post iom anstataŭi la nun ekzistantajn zoologian kaj botanikan nomenklaturejn. Tamen ĝi estos nur signifa kiam almenaŭ kelkaj dekoj da ordoj de animaloj aŭ de plantoj havos nomojn de siaj specioj en NBN, kaj kiam tiuj nomoj estos uzataj en sciencaj verkoj.

Ekz. : La nomoj de cetacoj kaj de polipteroj.

B. GVIDPRINCIPOJ

2. La lingvo uzata en NBN por la kreo de nomoj estas la internacia lingvo Esperanto. La nomoj do devus esti formataj pere de terminoj ekzistantaj en tiu lingvo aŭ elpensataj konforme al la reguloj de tiu lingvo.

Ekz. *Delfeno* jam ekzistas en Esperanto *Poliptero* supozeble ne ekzistis antaŭ ĝia unua uzo en la 1959, sed ĝi estas formita el la vorto **Polypterus**, grekdevena vorto de la scienca nomenklatureo.

REKOMENDAĴO: La vortoj en NBN estu bonsonaj kaj ne tro longaj (maksimume ses silaboj).

Ekz. : Delfeno Strangkolora sonas pli bone ol **Cephalorhynchus heavisidei** (GRAY).

3. Por konigi ke iu nomo apartenas al NBN oni metas ĝin inter asteriskoj. Se oni ne disponas pri tiuj signoj, oni povas anstataŭigi ilin per literoj NBN antaŭ kaj post la nomo.

Ekz. : La *Sulkarbaleno nigrobarta* estas la plej granda nun ekzistanta animalo . . .

Aŭ : . . . La NBN Sulkarbaleno nigrobarta NBN estas animalo. . .

ALDONAĴOJ : 1. Estas tamen memkompreneble ke en kazo de listoj la asteriskoj aŭ la NBN-literoj ne devas esti ripetataj por ĉiu nomo, sed ke sufiĉas unusola indiko de NBN surkape de la listo.

Ekz. : Konsultu la tabelon post la teksto »La nomoj de la cetacoj«.

2. Ĉar NBN-nomo estas facile distingebla en teksto, ĝi povas esti uzata en pluralo aŭ en akuzativo sen iu ajn malfacilaĵo.

3. Por eviti konfuzon en parolata teksto oni ankaŭ povas citi la literojn NBN antaŭ kaj post la NBN-nomo.

4. Se temas pri iutempaj specioj, ne plu ekzistantaj en la jarcentoj de zoologia esploro, sed kies konstitucio estas konata per fosiliaĵoj aŭ per alia indiko, NBN ankaŭ povas valori sed la nomo de la specio devas esti indikata per aldono de la litero F (signifanta: fosilia) post la unua asterisko kaj antaŭ la dua, aŭ post ambaŭ litergrupoj NBN.

Ekz. *F Faŭkbaleno gikabele F* aŭ NBNF Faŭkbaleno gikabele NBNF Servas kiel NBN-nomo por **Balaena-belgica** ABEL.

C. ĜENERALAĴOJ PRI LA NOMOJ EN NBN.

5. NBN-nomo de animala aŭ planta specio konsistas el du vortoj, el kiuj la unua referas al la familio, la dua al la specio.

Ekz. : *Sulkarbaleno giganta* estas specio apartenanta al la familio de la *Sulkarbalenoj*.

ALDONAĴOJ : 1. Se temas pri sub-specioj tria vorto estas aldonata.

Ekz. : Vidu sub 8.

2. La genro do ne estas indikata en NBN Tiel oni evitas la komplikaĵojn de transsalto de specio de unu genro al alia laŭ la diversaj opinioj de la aŭtoroj.

Ekz. *Lagenorhynchus albirostris* (GRAY) kaj *Stenella coeruleoaba* (MEYEN) apartenas al malsamaj genroj, sed iliaj NBN nomoj estas respektive : *Delfeno blankmuzela* kaj *Delfeno flankstria*

6. La unua vorto (kiu referas al la familio) estas substantivo kaj ĝi ĉiam finiĝas per —o. Ĝi ĉiam komenciĝas per majusklo.

Ekz. : *Delfeno*.

7. La dua vorto (kiu referas al la specio) prefere estas detaldona adjektivo, kaj ĝi tiam finiĝas per —a. Kelkfoje ĝi ankaŭ povas esti nesignifhava vorto kaj ĝi tiam finiĝas per —e. Tiu dua vorto ĉiam komenciĝas per minusklo.

Ekz. : En *Delfeno flankstria* la adjektivo estas detaldona. En *Delfeno klimene* la vorto »klimene« ne havas iun signifon.

8. En kazoj kiam temas pri subspecio, ekzistas tria vorto. Ĝi ĉiam estas adjektivo kaj ĝi finiĝas per -a. Tiu tria vorto ĉiam komenciĝas per minusklo.

Ekz. : *Delfeno diverskolora nigromara* estas subspecio de *Delfeno diverskolora*.

Ĉ. PRINCIPOJ PRI LA NOMOJ.

I) F a m i l i a n o m o .

9. Familia nomo estas substantivo kiu devenas de jam ekzistanta(j) Esperanto-vorto(j) aŭ kiu estas vorto estigita per esperantigo de genra nomo el la nuntempa scienca nomenklatureo.

Ekz. *Delfeno* (jam ekzistanta), *Poliptero* (esperantigita), *Sulkarbaleno* (kunmetita).

10. Laŭ la bezonoj la familia nomo povas esti kunmetita vorto. Tiu kunmeto povas cetere pli bone esprimi la rilatojn kiuj ekzistas en iu sama ordo.

Ekz. : *Sulketbalenoj*, *Sulkarbalenoj* kaj Faŭkbalenoj estas tri familioj de

unu subordo (anstataŭ: Eschrichtiidae, Balaenopteridae, Balaenidae).

Principaĵoj: I. Se tiu kunmetita vorto ebligas la priskribon de iu karakterizaĵo de tiu familio la vorto estas globala.

Ekz. : *Sulkarbalenoj* indikas la ekziston de aro da sulkoj sur la gorgo de la animaloj de tiu familio.

2. Se tamen tio ne estas ebla, oni uzos la jam ekzistantan aŭ la elpenseblan nomon de iu karakteriza specio, kaj tiam la familia nomo konsistos el du partoj, ligitaj per streketo.

Ekz. : *Kaĉalot-delfenoj* estas la nomo de familio (Physeteridae) kies anoj havas plurajn karakterizaĵojn malfacile resumeblajn en mallonga vorto, sed kiuj klare troviĝas ĉe specio, kiu jam ĝenerale estas konata per la nomo »kaĉaloto« (Physeter catodon LINNAEUS).

2) S p e c i a n o m o .

II. En ĉiu familio iu specio estas la tipa specio. Ĝia specia nomo estas *familiaritipa*.

Ekz. : La kaĉaloto **Physeter catodon** LINNAEUS, estante la tipa specio de sia familio, nomiĝas *Kaĉalot-delfeno familiaritipa*.

Aldonaĵoj: I. La tipa specio de ordo havas la specian nomon *ordotipa*

Ekz. : *Delfeno ordotipa*.

2. La tipo de subordo havas la specian nomon *subordotipa*.

Ekz. *Sulkarbaleno subordotipa*.

Nota: La nocioj pri tiuj tipoj estas indikataj sub 20-26.

12. Por aliaj specioj la specia nomo prefere estas priskriba adjektivo. Tiu adjektivo prezentas iun karakterizaĵon kiu ne estas tiel trafe trovebla ĉe alia specio de la sama familio.

Ekz. : *Delfeno malglatdenta* havas rimarkinde malglatajn dentojn, pli ol ĉe kiu ajn alia nuntempa specio de la familio.

Rekomendajoj: 1) La karakterizaĵo esprimata per adjektivo devas esti aplikebla al ĉiuj specimenoj de la specio, sendepende de aĝo, sekso, sezono aŭ io alia. Se vere ne estas eble trovi iun priskriban econ kiu estas propra al ĉiuj, oni devas indiki en la vorto ke ĝi referas al nur parto de ili, kaj oni devas ligi tiun limigon per streketo al la priskriba adjektivo.

Ekz. : En la familio *Zifio-delfenoj* karakterizaĵo de pluraj specioj estas grandaj dentoj, sed ili nur renkontiĝas ĉe la virseksaj animaloj. Tio do esprimiĝas per la uzo de »vire-« en nomo kiel *Zifio-delfeno vire-ponardodenta* per kiu oni nomas **Mesoplodon layardi** (GRAY).

2) Se du specioj multe similas unu al la alia kaj se iu nomo jam estas aplikebla al unu el ambaŭ, la alia povas havi la saman specian nomon antaŭtatan per la vorto »kva-zaŭ« ligita al ĝi per streketo.

Ekz. : *Delfeno kvazaŭ - gracibela* multe similas al *Delfeno gracibela*

3) Oni evituuzi la saman specian nomon por du specioj de unu sama ordo.

Ekz. : *Rostrodelfeno plumbnigra* kaj *Delfeno plumbkolora* ne havas saman specian nomon.

13. Se por iu specio iu karakteriza priskriba adjektivo ne estas facile trovebla, kaj se tiu specio jam ĝenerale estas konata per iu propra nomo en Esperanto, oni povas forĝi iun adjektivon per aldonado de la finaĵo »-noma« al la substantiva nomo.

Ekz. : La foceno, **Phocoena phocoena** (LINNĒ), bone konata sed malfacile karakterizebla per iu adjektivo, iĝas *Delfeno focenonoma*.

14. Geografia nomo estas nur uzata se la tri antaŭaj eblecoj ne donas iun solvon kaj se evidentiĝas ke la nomo

pli malpli koincidas kun la konata areo de dispersiĝo de la specio kaj ke ne aliaj specioj de la sama familio ĝenerale renkontiĝas en tiu sama regiono.

Ekz. : *Delfeno grajana*, **Sotalia guianensis** (P. J. VAN BENEDEN), estas propra al la marbordo kaj la riveroj de Gvajano kaj de tutapudaj regionoj, ne al aliaj; cetere en tiu regiono ne troviĝas alia specio de *Delfeno*.

15. Se ne troviĝas ebleco trovi konvenan, ne tro longan, adjektivan nomon por la specio, povas esti alprenata kiel dua vorto de la nomo iu sensenca vorto finiĝanta per -e (la finaĵo de la adverbo).

Ekz. : *Delfeno klimene* **Stenella clymene** (GRAY), estas apenaŭ konata specio, kies karakterizaĵojn oni ne povas priskribi.

Rekomendaĵo: En la elekto de la dua vorto oni lasu sin gvidi per la speciaj nomoj jam ekzistantaj en la nuna zoologia aŭ botanika nomenklaturetoj, adaptante ilian ortografion al tiu de Esperanto, kaj aŭ aldonante —e, aŭ anstataŭante la finaĵon per —e. Se tio povas konduki al konfuzoj, oni serĉu inter la iamaj sinonimaj nomoj de la specio aŭ oni elpensu anagraman vorton.

Ekzemploj :

Delfeno klimene

Stenella clymene (GRAY)

Delfeno astenopse

Stenella asthenops (COPE)

Delfeno krotafiske

Stenella crotaphiscus (COPE)

Delfeno alope

Stenella longirostris (GRAY)

Delfeno sunise

= **Stenella alope** (GRAY)

Phocoena sinus NORRIS & MACFARLAND.

3) Subspecia nomo.

16. La subspecio, kiu estas tipa por la specio, havas kiel atributon la adjektivon »tipregiona«.

Ekz. : *Delfeno diverskolora nigromana* por **Delphinus delphis delphis** LINNAEUS.

Rimarko : Por la nocio pri la subspecia tipo, vidu sub ero 25.

17. La nomo de subspecio alia ol la tipa estas difinita laŭ la geografia dispersiĝo de tiu subspecio.

Ekz. : *Delfeno diverskolora tipregiona* por **Delphinus delphis ponticus** BARABASH—NIKIFOROV, subspecio el la Nigra Maro.

4. Ordaj kaj subordaj nomoj.

18. Ordo estas nomata laŭ la nomo de la familio, en kiu troviĝas la ordotipo, kun aldono de la finaĵo —ozuloj.

Ekz. : *Delfenozuloj* estas la ordo, kiun oni nomas aliloke »Cetacoj«.

19. Subordo enhavas en sia nomo la nomon de la ordo, sed kun antaŭaldono de la karakterizaĵo de la subordo.

Ekz. : *Dentdelfenozuloj* kaj *Bartdelfenozuloj*.

D. LA NOCIO »TIPO« EN N. B. N.

I. Gvidaj ideoj.

20. Por ĉiu ordo da animaloj aŭ plantoj la kompilanto de NBN-nomaro elektas iun specion, kiu estos la tipa specio de tiu ordo. Tiu specio nomiĝas *ordotipa*.

Ekz. : *Delfeno ordotipa* estas la tipo de la *Delfenozuloj*.

21. En la kazo ke oni distingas subordojn en tiu ordo, la ordotipo estos samtempe la tipo de unu subordo, sed

por la aliaj subordoj devas esti elektataj specialaj subordotipoj. En tia subordo tiu tipa specio nomiĝas *subordotipa*.

Ekz. : De la subordo *Dentdelfenozuloj* la specio *Delfeno ordotipa* estas la subordotipo, sed en la alia subordo, la *Bartdelfenozuloj* la specio *Sulkarbaleno subordotipa* estas la subordotipo.

22. Same en ĉiu familio iu specio devas esti la familitipo. Tiu specio nomiĝas *familitipa*. Estas memkompreneble ke ordotipoj kaj subordotipoj valoras kiel familitipoj sed konservas sian nomon.

Ekz. : *Delfeno ordotipa* kaj *Sulkarbaleno subordotipa* estas familitipoj de (respektive) *Delfenoj* kaj *Sulkarbalenoj*, sed en la familio *Zifio-delfenoj* iu specio estas *Zifio-delfeno familitipa*.

23. Inter la eventualaj subspecioj unu estas tipa, ĉar ĝi estas la subspecio de la tipa regiono. Ĝi havas la predikaton *tipregiona* kiel trian vorton de la nomo.

Ekz. : *Delfeno diverskolora tipregiona* kaj *Delfeno ordotipa tipregiona*.

2. Elektro de tipoj.

24. La tipo de ordo, subordo aŭ familio ne necese estas la unue priskribita specio, sed tiu kiu plej bone konvenas por studoj.

Ekz. : Vidi sub 20, 21 kaj 22.

REKOMENDAĴOJ : Por la elekto de ordotipoj, subordotipoj kaj familitipoj la elekto devus esti gvidata per jenaj kriterioj, kiuj havas sinsekvan gravecon :

1. dispersiĝo de la specio sur la ter globo
2. adaptiteco de la specio al pluraj vivmedioj

3. multnombro de la specio kompare al aliaj

4. nuntempa koniteco de la specio per priskriboj, figuroj kaj studoj

5. globala multnombro de specimenoj de la specio en sciencaj kolektoj

6. konvena volumena formo de la specio kompare kun aliaj

Ekz. : Tursiops truncatus (MONTAGU) ŝajnas esti la plej konvena specio por esti la tipo de la *Delfenozuloj*. Ĝi troviĝas en preskaŭ ĉiuj maroj, tiel apud la kontinentoj kiel pli malproksime; cetere ĝi estas multnombra kaj tre konata kiel animalo de sciencaj studoj, libroj, tekstoj, filmoj, cirkoj, akvariejoj k.t.p., multe pli ol la specio **Delphinus delphis** LINNAEUS. Multaj kolektoj posedas skeleton aŭ rembiritan ekzemplon de ĝi. Ankaŭ ĝia volumeno estas pli konvena ol tiu de balenoj aŭ de aliaj grandaj specioj.

25. La tipa subspecio de iu specio estas tiu kies normala vivteritorio dum la reprodukta sezono troviĝas plej apude de:

a) la latitudo 50° norde

b) la meridiano 5° oriente de Greenwich (2)

Tiuj du linioj havas sinsekvan valoron en la decido pri la tipa subspecio

Rimarko: Tiuj du geografiaj linioj estas preferataj ĉar ili kvazaŭ ne pasas tra insuloj, duoninsuloj, duoninsuloj, grandaj lagoj aŭ montaroj. Ambaŭ linioj renkontiĝas en Belgio en la vilaĝo Bièvre (3). Subspecioj kiuj normale renkontiĝas en tiu ĉi loko, nepre estas konsiderataj tipregionaj.

3) Tipaj ekzempleroj

26. La NBN ebligas ke la tipo de iu specio ne estas la unue priskribita ekzemplero, sed iu, kiun koncerna specialisto, kiu akceptas la NBN-nomaron, indikos kaj pri kiu li donos tre detalan priskribon (en kiu ajn lingvo) de la ekstera aspekto, de la konserveblaj partoj kaj de la organoj, kiuj normale utilas por la specideterminado.

Ekz. : De 8 specioj de *Delfenozuloj*, priskribitaj siatempe de LINNE, ne ekzistas tipaj specimenoj. Ankaŭ de *Delfeno gvajana*, ne ekzistas vera tipa specimeno laŭ la postuloj de la nuna zoologia nomenklaturaro. Iu nova ekzemplero povus esti indikata kiel tipo de la specio por NBN. Rekomendaĵoj: I. La NBN-tipspecimeno neniel povas flankiĝi de la koncizaj priskriboj de la tipa specimeno de la nuna zoologia aŭ botanika nomenklaturaro.

2. Estus alstrebinde se en iu kolekto povus esti kunigataj la NBN-tipspecimenoj de ĉiuj specioj de iu familio.

3. Atendante la indikon de NBN-tipspecimenoj provizoraj tipspecimenoj povas esti indikataj fare de kompetenta specialisto.

E. PLIAJ KONSILOJ.

I) Distingo de genroj.

27. Ĉar genroj ne estas distingataj en NBN, estas konsilinde konigi en listoj de la specioj la diversajn genrojn, kiujn rekonas la listo, kiu servis kiel modelo, per indiko de literoj kaj ciferoj kiuj referas al la sinsekvo de tiuj genroj.

Ekz. : Vidu ekzemplon en la studo »La nomoj de la cetacoj«, kiu sekvas la dividon aplikatan de HERSHKOVITZ en »Catalog of living whales«.

Rimarko: Se ĝis nun oni ne distingis plurajn genrojn en iu familio kvankam oni konjektas ilian distingon, tiu numera sistemo ankaŭ povas esti aplikata.

Ekz.: Vidu ekzemplon en la studo: »La polipteroj, strangaj afrikaj fiŝoj«.

2) Distingo de subfamilioj, suprefamilioj, supreordoj kaj subklasoj.

28. En NBN la sciencisto kiu volas indiki subfamilion indikas ĝin per la vorto »sub« ligata per streketo al la nomo de la familio kaj sekvigante ĝin per majuskla litero.

Ekz.: en la familio de la *Delfenoj* oni povus distingi *Sub-delfenojn A*, *Sub-delfenojn B* k. t. p. laŭ prefero de la aŭtoro.

Aldonaĵo. Simile oni povas agi pri subklasoj, ne pri subordoj

29. En NBN la sciencisto kiu volas distingi suprefamilion, indikas ĝin per la vorto »supre« ligita per streketo al la nomo de la plej speciriĉa familio.

Ekz.: Oni povus paroli pri *Supre-delfenoj* se tio necesus.

Aldonaĵo. Simile oni povas agi pri supreordoj.

3) Nomoj de organoj kaj korpopartoj

30. Por eviti la kreon de tro longaj nomoj en NBN, la karakterizaj organoj devas havi sian propran nomon; kiun oni povas enkonduki prenante ĝin el alia lingvo.

Ekz.: La vorto »barto« estis tre utila devenanta el la germana lingvo)

Rimarko: Tio speciale valoras por organoj kiuj per sia strukturo ne povas ricevi la nomon per kiu oni indikas ilin ĉe aliaj animaloj aŭ plantoj

Ekz.: La strukturaĵoj per kiuj *Delfenozuloj* remas en la akvo, fakte estas antaŭaj membroj, kaj ili do ne

meritas la terminon »naĝiloj« kies ekvivalenton oni tamen trovas en pluraj lingvoj) ĉar tia termino devus esti rezervata por strukturaĵoj ĉe la fiŝoj. Estas konsilinde enkonduki por ili specialan terminon »fliperoj«, devenanta de la angla termino »flipper«. Tio ebligas la nomigon de *Delfeno longflipera*.

F. UZO KAJ OFICIALIGO DE NBN-NOMOJ.

I. Adeptoj de NBN.

31. Por enkonduki kaj stimuli la uzon de NBN, ekzistos »asocio por la enkonduko de NBN«. Al ĝi povos aparteni ĉiu instruita homo aŭ asocio kiu simpatias kun la ideo kaj kiu kontribuas al ĝi laŭ difinitaj reguloj. La asocio devas konsisti el minimume tri personoj.

Rekomendaĵo: La anoj de tiu asocio uzu la NBN-nomojn kiel eble plej multe.

32. La anoj de la »Asocio por la enkonduko de NBN« elektu inter si por periodo de tri jaroj gvidantaron konsistantan el tri personoj. Tiuj tri personoj decidus inter si kiu estos la ĉefgvidanto.

Rekomendaĵoj: 1. La anoj de la gvidantaro estu personoj kun vera intereso pri la biologio.
2. La anoj de la gvidantaro estu universitate diplomitaj personoj.
3. La ĉefgvidanto estu profesia biologo.

2. Oficialigo de listo de NBN — nomoj.

33. Por ĉiu kompleta listo de NBN-nomoj la gvidantaro kunmetos komisionon de tri personoj kiuj devos pristudi ĝin kaj kiu devas aprobi ĝin.

Rekomendaĵoj: 1. La tri personoj estu universitate diplomitaj personoj, kiuj faris esplorojn sur la kampo de biologio.

2. Ne estas postulende ke ĉiu komisionano estu ano de la asocio.

3. La listo devas esti apobata unu anime.

4. Se du jarojn post la transdono de la nomaro al la komisionanoj la decido ne estas prenita uunanime, la kompilinto de la nomaro povas peti alian komisionon.

34. Post aprobo fare de la komisiono, la gvidantaro publikigos la liston de la nomoj en iu revuo.

REKOMENDAĴOJ: 1. La listo estos valida de la tago kiam la komisiono aprobis ĝin.

2. Por eviti la dispersiĝon de tiuj listoj inter tro da revuoj la gvidantaro elektos por periodo de tri jaroj la revuon en kiu ili aperos.

Notoj

(1) Tiu mallongigo signifas en pluraj gravaj lingvoj:

New Biological Nomenclature (English)

Nomenclature Biologique Nouvelle

Neue Biologische Nomenklatur

Nomenclatura Biologica Nuova

Nieuwe Biologische Nomenklatuur

kaj simile

(2) Tiuj ĉi geografiaj linioj dependas de la nun ĝenerale akceptata sistemo en kiu oni dividas cirklon en 360 gradoj kaj de la internacia prefero nuntempa preni Greenwich —

3. Modifoj de la NBN —
nomaro.

35. La aprobita listo estu konata kiel la unua listo pri la ordo. Malkovro de novaj specioj aŭ necesa distingo de plia familio aŭ necesa anstataŭigo de specinomo per alia, aŭ similaj necesaĵoj, devas esti submetataj al la koncerna komisiono kaj aprobataj de ĝi. Ili aperos kiel aldonajoj kaj ili kondukos al eroj de dua listo, al kies apartigo estos referata per aldono de signo (2) post la NBH-nomo antaŭ la fina astersko aŭ antaŭ la fina NBN.

36. Tiu dua listo povas esti kompletigata ĝis kiam por iu jam modifita nomo necesos plia modifo. De tiam ekestos tria listo indikota sammaniere per la signo (3), kaj tiel plu.

meridianon kiel deirpunkton. Eĉ se tiuj internaciaj kutimoj ŝanĝiĝus oni tamen preferu devus konservi tiujn liniojn.

(3). La krucpunkto de tiuj du linioj estas multe pli proksima de la vilaĝo Haut-Fays ol de la vilaĝo Bièvre. Bièvre apartenas al la provinco de Namuro, Haut-Fays al la provinco Luksemburgo. La krucpunkto estas tre proksima de la provinca limo kaj troviĝas meze de arbaro. La vilaĝoj troviĝas je la norda flanko de la Ardena montetaro sur deklivo direktata al la Famenaj regiono. La krucpunkto troviĝas je alteco de 420 m super mar-nivelo. La subgrundo apartenas al la Famenaj tavolo.